

SOLENO DE LA TRE SANKTA TRIUNUO - 11an de junio 2017

DIO SENDIS SIAN FILON, POR KE LA MONDO PER LI SAVIĜU

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 3, 16-18

En tiu tempo Jesuo diris al Nikodemo: „Dio tiel amis la mondon, ke Li fordonis sian unikan Filon, por ke ĉiu, kiu kredas je Li, ne pereu, sed havu eternan vivon. Dio sendis sian Filon en la mondon, ne por kondamni la mondon, sed por ke la mondo per Li saviĝu. Kiu kredas je Li, ne estos juĝata; sed la nekredanto jam estas juĝita, ĉar li ne kredas en la nomo de la ununaskita Filo de Dio.“

Estas tipa de ĉiu religio la bildo de iu Dio kiu juĝas kaj poste kondamnas, iu Dio kiu premias la bonulojn, sed punas la malbonulojn. Ĉi tiu bildo de Dio tute forestas en Jesuo, kiu eĉ malkonfirmas la bildon de iu Dio kiu juĝas kaj kondamnas. Ni aŭdu kion skribas por ni Johano, en ĉapitro 3, versikloj 16-18. La kunteksto estas tiu de la interparolo kun la fariseo Nikodemo - fariseoj ĝuste atendis mesion kiu estu esprimo de dia juĝo - Jesuo diras, ke ne.

“Dio tiel amis la mondon, ke Li fordonis sian unikan (pli ĝuste: ununaskitan) Filon,”, Jesuo deklaras sin esprimo de la amo de Dio al la homaro - Dio esprimas sian amon donante sian filon - *“por ke ĉiu, kiu kredas je Li,”*, kredi ne signifas aliĝi al iu doktrino, sed aliĝi al iu persono, al lia mesaĝo, ĉi-okaze al Jesuo, *“ne pereu, sed havu eternan vivon.”*. Duafoje, en ĉi tiu ĉapitro, aperas temo tre kara al la evangeliisto, tiu de la eterna vivo. Fariseoj opiniis, ke la eterna vivo estas premio, ricevota en la estonteco, pro la bona konduto dum la nuna vivo; laŭ Jesuo, kontraŭe, ĝi estas kondiĉo en la nuntempo. La vivo nomiĝas eterna ne tiom pro la senfina daŭro, kiom pro la nedetruibla kvalito.

Kaj daŭrigas Jesuo: *"Dio sendis sian Filon en la mondon, ne por kondamni"*, la verbo ne estas juĝi en la senco kondamni, la greka verbo utiligita de la evangeliisto signifas eldoni juĝon, do ne nepre kondamni, *"la mondon, sed por ke la mondo per Li saviĝu."* Jesuo venis por proponi al la homo vivalternativon, eblecon de kresko, de plena realigo de sia ekzisto.

"Kiu kredas je Li, daŭrigas Jesuo, "ne estos juĝata;" do la bildo de juĝo fare de Dio forestas en la mesaĝo de Jesuo, oni iras renkonte al neniu juĝo kaj tial al neniu kondamno, *"sed la nekredanto jam estas juĝita, ĉar li ne kredas en la nomo de la ununaskita Filo de Dio"*, kaj ĉi tie oni devas aldoni du versiklojn kiuj, en la liturgia versio, malestas, alie oni ne komprenas, ĝi ŝajnas kontraŭdiro. Jesuo daŭrigas dirante, ke la juĝo estas jena: *"la lumo venis en la mondon"*, kaj li konkludas: *"Ĉiu, kiu faradas malbonon, malamas la lumon,"*; ne estas juĝo fare de Dio, estas propono de vivo, ĉi tie bildigita kiel lumo; apartenas al la homo, senti sin altirita de ĉi tiu lumo kaj eniri en la aman konuson de la savo, sed kiu faradas malbonon, estas sciante, malamegas la lumon. Kiu faradas malbonon volas la mallumon, kaj do eĉ pli li enŝoviĝas en la mallumon, kiu estas bildo de la morto. Do ne juĝo fare de Dio forpuŝas la personon, sed la persono - pro sia intereso, por sia profito, jen la malbono - malakceptas la proponon de vivpleneco kiu venas de Dio. Dio povas fari nenion alian ol briligigi eĉ pli sian lumon, sed ju pli brilas lia lumo, des pli por la malbonfaranto tio estas minaco, estas io kio blindigas lin, estas io kio lin abomenas. Do la invito de la evangeliisto estas jena, ke oni plenumu ĉiutage lumajn farojn, por povi eniri en plenan agordon, en komunecon kun tiu Dio kiu estas lumo kaj kiu estas amo.